# LA FERVOJISTO

ITALA FERVOJISTA ESPERANTISTA ASOCIO

A. I. F. E.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Dopolavoro Ferroviario - Via XX Settembre, 17
VERONA (Italia)

## INFORMA BULTENO

Nº 4 = Aprilo 1953

## UTRECHT = 1953

Ankoraŭ unu fojo jen la Europaj Esperantistoj Fervojistoj kunigitaj en fratecaj intencoj. Nur tiuj, kiuj vivas inter ili dum la labortagoj kiam ili estas enfermitaj, eĉ se en vasta ejo, por priparoli kaj pridiskuti pri la plej bona organizado, por ia des pli granda disvolviĝo de ilia Internacia Asocio, por pli bone kaj pli rapide atingi la finpunkton t.e. la kompiladon de komuna terminaro pri la fervoja materialo kiu celas plifaciligi kaj igi malpli eraraman ilian laboron, nur tiuj povas kompreni la grandan gravecon kaj utilecon de la komuna lingvo, kiun ili uza: Esperanto!

Sed, precipe la valoro de tiuj internaciaj kunvenoj estas donita de tiu vera kaj propra frateca sento, kiu elŝprucas el la reciproka konado, kiun oni ŝuldas al interŝanĝo de ideoj, sentoj, intencoj ebligita per Esperanto, kiu senpere kontaktigas la finlandanon kun la italo, la norveganon kun la franco, ktp., homoj el lingvo, karakteroj kaj moroj tiom diversaj.

Nur vivante inter ili dum tiuj tagoj kiam ili kongresas, eĉ la skeptikulo, eĉ tiu, kiu konsideras la esperantistojn kiel utopistojn, revulojn de ne realigebla revo, tiu eliras el la kongresejo tute maltrankvila, lia skeptikismo malaperas, por li la revuloj fariĝas pioniroj de ebla ĵo kiun oni devas helpi tial ke ĝi fariĝu por ĉiuj praktika realaĵo. Ili mem, la skeptikuloj, kaŝe provizas al si je esperanto-gramatiko kaj siavice ili fariĝas por aliaj personoj, utupistoj, revuloj, por malmultaj vortoj, ili fariĝas esperantistoj.

Kaj estas pro tio ke se en Utrecht oni transdonos al ni la honoron kaj la ŝarĝon organizi en Italio la VIan Internacian Kongreson de la Esperantistaj Fervojistoj, ni klopodos inviti la dubantoj, la skeptikulojn, la naturajn kaj obstinajn pesimistojn ĉeesti la malferman kunsidon kun la kunvinko ke ni sukcesos ŝanĝiĝi lian opinion pri ni, kaj igi ilin konsideri pli reale la valoron kaj gravecon de Esperanto laŭ la celo de ni celita, tiom multe ĝis kiam ili fariĝu niaj amikoj, niaj samideanoj, niaj esperanto-propagandistoj.

LA SEKRETARIO

VITA dell'AIFE                                    Brevi note

Fin d'ora possiamo annunciare che nel mese di SETTEMBRE p.v. in un giorno da stabilirsi, ma che potrebbe essere il giorno 6, avrà luogo il III° CONGRESSO NAZIONALE FERROVIERI ESPERANTISTI in Como. Possiamo anche fin d'ora comunicare una qualche indiscrezione e cioè che con ogni probabilità i congressisti iscritti al D.L.F. ed alla nostra Associazione, potranno godere di una concessione speciale di viaggio gratuita, dalla propria residenza a Como e ritorno. E' una indiscrezione, che diciamo sottovoce, cioè con discrezione, ma che farà certamente piacere ai nostri soci, in particolare ai pensionati. Contiamo di darne conferma col nuovo Bollettino. =Per dimostrare che con queste note non diciamo cose campate in aria, confermiamo che a VICENZA si è ufficialmente costituito il Gruppo F.E. con un segretario responsabile, che ha già iniziato un suo primo corso di esperanto aperto ai ferrovieri. % SALERNO non ha ancora risposto alla nostra aspettativa, che non sarà tuttavia sempre tale: si è aggiunta invece un'altra città alla nostra collana: LA SPEZIA. % Più che soddisfacente il numero dei partecipanti ad Utrecht, che superano la trentina. Pochi invece i simpatiantoj o simpatizzanti, mentre avremmo voluto che fossero tanti, così da invogliarci a creare anche noi per il VI° Congresso che sarà tenuto in Italia, tale categoria di Congressisti, tanto utile a sostenere le ingenti spese e dar vita ad un simpatico gesto di solidarietà esperantista. Non è mai tardi per quei nostri soci che non avessero sufficientemente riflettuto su questo fatterello tanto semplice e pur tuttavia tanto importante; compilino dunque l'aliĝilo ed inviino a noi sia l'aliĝilo che il guldeno (L. 165.=)

VITA dei GRUPPI

BOLOGNA = Il Gruppo F.E. si è fatto iniziatore di una gita ad UTRECHT durante il periodo del Congresso, per dar modo ai non Esperantisti di poter partecipare alla inaugurazione di esso. La gita viene organizzata dal D.L.F. di Bologna ed abbiamo la sensazione che numerosi saranno i partecipanti. L'OLANDA..... i mulini a vento, le belle olandesine con gli zoccoletti e le caratteristiche cuffiette, le sue linde casette, le ampie distese di terra ed i suoi giardini variopinti di tulipani, narcisi, giacinti dai più svariati, vivaci colori, Amsterdam la Venezia del Nord, sono indubbiamente un invito a non perdere una magnifica occasione: UN VIAGGIO IN OLANDA !!!

VICENZA = Come accennato più sopra, il 15 c.m. si è aperto un corso di Esperanto presso la sede della Scuola Libera Popolare di Corso Palladio 186. Invitiamo i samideani Vicentini a tenerci informati dello svolgimento di detto corso.

TORINO = Indirettamente abbiamo saputo che anche in Torino si è aperto un corso di Esperanto per ferrovieri. Auguriamo un buon numero di partecipanti e un buon successo finale.

GENOVA = Un nostro vecchio samideano, vecchio di attività esperantista, si è fatto iniziatore di un corso di Esperanto fra ferrovieri. Questi corsi danno i loro frutti e sono da questi corsi che vengono nuovi soci ad aumentare le fila della nostra Associazione, che va espandendosi sempre più.

## NIA AKTIVECO

En tiu ĉi tagoj, ni sendas al la Transpor-Ministro de Italaj Fer=vojoj, peton ĉar nia fervoja administracio volu rekoni nian Aso=cion kiel intelekta sekcio de la Fervoja Postlaboro.

Ni reproduktas tie ĉi la saman peton, tradukita de nia samide=ano Giuseppe Quarone el Milano.

=%=%=%=%=

La 17an de septembro 1950 en Milano, ĉe la sidejo de tiu Fer=voja Postlaboro, oni restarigis la "ASSOCIAZIONE ITALIANA FERRO=VIERI ESPERANTISTI" kun la celo unuigi en tiu unika Asocio la i=talajn esperantistajn fervojistojn el ĉiuj grado kaj fakoj, eksci=tigi kaj favorigi la propagandon kaj la disvastiĝon de Esperanto kiel helpa lingvo en konsento kun la fervojistoj de la ceteraj landoj el kiuj konsistas la eŭropa fervoja relato, unuigitaj en la "Internacia Federacio Esperantistaj Fervojistoj" (IFEF).

"AIFE" havos nur kulturajn kaj praktikajn celojn, kaj ĝi devos sin teni for el ĉiu manifestado ĉu politika, ĉu religia, ĉar ĝi devos unuigi, pro necesaj aferoj, personoj el malsama fido.

Ĝia unua atingenda celo estos tiu ellabori kun la eksterland=aj fervojaj esperantistaj asocioj, je la kompilado de teknika vor=taro enhavante ĉiujn vortojn koncernantaj la vojaĝantojn, la ma=terialon, la maŝinojn, la relvojon, la kontaktiĝantajn trakojn, plifaciligante tiamaniere la laboron en la landlimaj stacidomoj, en la internaciaj transportoj, en la perletera komunikaĵoj inter la diversaj fervojaj administracioj.

Plia tasko de "AIFE" estos helpi per informoj,konsiloj, gvid=iloj, ktp. al tiu internaciaj vojaĝantoj, kiuj transiras niajn landlimojn por vizitoj ĉu aferaj ĉu turismaj, kaj, konante Espe=anton sin turnas al nia Asocio ĉu kiel izolaj, ĉu karavane.

De post tiu 17a de Septembro 1950 l'AIFE atingis disvastiĝon, kiun ni povas juĝi kontentiga, se ni kalkulas pri la peza laboro kiun tiu ĉi Asocio estas devigata disvolvi en malfacilaj situaci=oj, sen la helpo, anstataŭigante ĉiun mankon per la entuziasmo de=venante el la certeco akiri bonan rezultaton.

Fakte ni havas fervojistajn esperantistojn en diversaj italaj urboj, nome: Verona, Bologna, Milano, Genova, Torino, Pisa,Trie=ste, Vicenza, Voghera, Udine, Benevento, Mantova Roma, Forli',Na=poli, Tarvisio, unuigitaj en Grupoj, kiuj povus pli multe disva=stiĝi, se nia Asocio povu akiri esti konsiderata de la Fervoja Ad=ministracio eĉ nur kiel kulturan sekcion de nia Fervoja Postlabor=o, ĝuante je tiuj avantaĝoj kiuj estas ĝuataj de la diversaj sport=branĉoj aliĝantaj al Postlaboro.

En ĉiu nacioj, kie ekzistas Naciaj Asocioj de Esperantistaj Fer=vojistoj, ĉi tiuj, flanke de siaj propraj Administracioj, ĝuas a=vantaĝojn, el kiuj, mallonge, ni traskribas ĉi sube tiujn, kiuj e=stas konataj al ni:

FRANCIO = La Federacio de Fervjistaj Esperantistoj estas Sekcio de la "Intelekta kaj Belarta unuiĝo' de la Francaj Fer=vojistoj". Ĉiu jare ĝi ricevas subvencion je 50.000.= frankoj. Gi ĝuas senpagan ejon por Esperanta kursoj,kun

./.

venoj, paroladoj, ktp. Al Internacia Kongreso de E=
sperantistaj Fervojistoj, kiu okazis en Lindaù (Ger=
manio) la pasintan monaton de Majo, la Fervoja Admi=
mistracio sendis sian propan oficialan reprezentanton
kiu faris pli ol favoran raporton.

FINLANDO = La Federacio de la Esperantistaj Fervojistoj havas pro
pran sidejon en la ejoj de la Fervoja Administracio,
kun senpaga uzo de la ejtado kaj lumigado por siaj fe=
stoj kaj siaj kunvenoj. Plie, ĝiaj aliĝantoj rajtas
havi senpagan vojaĝ-bileton por iri al Internaciaj Kon
gresoj.

DANLANDO = Okaze la Ia Internacia Kongreso de la Esperantistaj
Fervojistoj en Danlando (jaro 1948), la Ĉefo de la 2a
Fervoja Distrikto, akceptis la Honoran Prezidon de tiu
Kongreso kaj partoprenis al ĝi parolante favore al E
speranto. La Fervoja Esperantista Asocio havas je sia
dispono ejojn por Esperanto-kursoj kaj por kunvenoj.
La Fervoja Postlaboro pagas honorarion al instruanto
de Esperanto kaj provizas je gramatikoj ĉiun lernant=
on, kiu partoprenâs la kursojn. Se la korstudado koin
cidas la horlaborado, la lernanto rajtas partopreni
la kurson. Por la antaùdirita Ia Internacia Kongreso,
la Fervoja Postlaboro pagis monhelpon je 100 kronoj.

NORVEGUJO = La Federacio de Esperantisaj Fervojistoj ricevas jaran
monhelpon je 500 kronoj. Alian monhelpon ĝi ricevas
ankaù de la Fervoja Sindikato (neekzistas Postlaboro)

NEDERLANDO =La Federacio de Esperantistaj Fervojistoj ĝuas senpag
an sidejo en la ejoj de la Fervoja Administracio por
kursoj de Esperanto, enkalkulite la elspezon por la
instruisto. Senpagan uzon de salono por kunvenoj,kon
gresoj kaj grandan helpon por la eldonado de la Bul=
teno, nome: senpagan liveron de papero kaj uzon de la
ciklostilmaŝino.

AUSTRIO = la Fervoja Esperantista Grupo estas simpatie konside=
rata de la Fervoja Administracio, kiu permesas al la
Grupaliĝantoj porti dum la deĵoro, la verdan stelon,
simbolo de Esperanto, kaj elsendi pere la deĵor-poŝt=
aĵoj, lamaterialon kaj korespondaĵon por la Esperanta
kursoj, kiuj okazas en la ejoj de la Administracio.
Ĝi permesas la afiŝadon de afiŝoj en la stacidomoj kun
adresoj de la Esperantistaj fervojistaj por plifaci=
ligi la restadon al eksterlandaj esperantistoj. Al kon
greso de Lindaù (Germanio) la Aùstria Fervoja Admini=
stracio sendis oficialan reprezentanton.

(daùrigota)

=%=%=%=%=%=%=

Tiujĉi francaj samideanoj deziras korespondi kun Ita=
laj samideanoj:

Sro DELAQUAISE, 6, rue des Chausseurs ARGENTEUIL (Seine et Oise)
Fino BOUCHON, 20, rue Gallieni HOUILLES (Seine et Oise)

=+0+=+0+=0=+0+=0=+0+=+0+=